

Pos-Amiko

IJK 2022, mardo, numero 45
Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

Dormantoj plendas pri bruo

“Mi volis trankvile iri dormi je la oka en mia ĉambro super la Scenejo, kaj subite iu ekfaris koncerton tie. Kiu imagus?”

Frua estrarano kaperas TEJO-n

Malfrua fino de tagmanĝo kaj bona kono de la reguloj kaŭzis grandan ŝokon en TEJO. Post longaj vicoj en la manĝejo je la oficiala komenchoro de la komitatkunveno, 14:00, ĉeestis nur manpleno da komitatanoj, inter kiuj estis nur unu estrarano. Laŭ la koncerna regla-mento en tiu specifa okazo la prezidado, proponado kaj voĉkalkulado ĉiuj estu faritaj de la sola ĉeestanta estrarano.

Anstataŭ atendi la alvenon de la malfruuloj, la estrarano en sia rolo de kunsidestro tuj malfermis la kunvenon, proponis ŝanĝon de tagordo kaj tuj starigis voĉdonon pri ĝi. Kaj kvankam aliaj ĉeestantaj komitatanoj rakontas, ke ili ne voĉdonis por la ŝanĝita tagordo, la voĉdonkalkulanto registris plimulton.

En la sekvaj minutoj la Komitato voĉdonis pri nova buĝeto kun multe pli alta buĝetero por estrarkunsidoj, nuligo de la venonta IJK, kaj eksigo de ĉiuj estraranoj neĉeestantaj. Ĉiuj voĉdonoj ricevis dutrionan plimultan laŭ la voĉdonkalkulanto.

Je 14:05, kiam komencis alveni pliaj homoj el la manĝejo, la kunsido jam estis fermita, ĉar la nova honora prezidanto kaj sola restanta estrarano volis iri naĝi en la lago. La venonta estrarkunsido okazos venontsemajne sur Majorko, kaj la venonta komitatkunveno nun ne havas konatan daton, ĉar ordinara komitatkunveno okazas dum IJK.

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Aŭgusto estas bona monato por iĝi komitatano en TEJO.

Taŭro: Por ricevi la freŝan Pos-Amikon ĉiam en via poŝtkesto, printu kaj sendu ĝin mem.

Ĝemeloj: Vi malkovras, ke pli bonodoras brovejo ol bovejo.

Kankro: Ĉu vi serĉas novan hobion? Aliĝu al la teamo por organizi la sekvan IJK-n!

Leono: Se vi ne ŝatas vian landan sekcion, deklaru novan landon kun landa sekcio.

Virgulino: Post longa rigardo de Tim Gallego vi ne plu estos.

Pesilo: Vi daŭre atendas en la manĝovico kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Se mankas steloj en via monujo, fotu pliajn en la ĉielo nokte.

Robin: Ne timu paperajn Pos-Amikojn, ili ankaŭ legeblas per komputilo.

Sagitario: Ne paniku. Tiam vi varmiĝas kaj la planedo jam estas tro varma!

Kaprikorno: Atentu: estas danĝere iri naĝi dum la manĝado.

Akvisto: Defio de la tago: diru du malajn klaĉojn, kaj vidu kiu pli rapide rondiras.

Fiŝoj: Matena gimnastiko multe pli facilas, kiam ĝi okazas en malfrua posttagmezo.

Programo

	Manĝejo	Ekstere	Scenejo	Filmejo	For
08:00	Matenmanĝo				
09:00	Novula programo	Tajĵi			Bicikla ekskurso bierbrovejo
10:00	TEJO pli tutmonda	Kurso por progresantoj			
11:00	Retoso				
12:00	Tagmanĝo				
13:00					
14:00	Vivo de plantoj		Mambo	Ne rigardu supren Parolu!	
15:00	Astrofotado		Baĉato		
16:00	Klimata krizo				
17:00		Gimnastiko			
18:00	Vespermanĝo				
19:00					
20:00			Tim Gallego		
21:00					
22:00	Trinkejo	Astrofotado	Elektronika diskejo		